

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Feliĉan Novjaron 2021!

Karaj membroj kaj legantoj!

Pardonu nin pro longa silento. Fakte en la jaro 2020, pro la kriza situacio de KOVIM-19, nia agado ŝrumpis, tamen kunlernado per la komputila programo Zoom, aŭ en la posta duono, ĉeestaj lernadoj ja okazis. La plej granda afero ĉe ni estas la akiro de la domo por la "muzeo", pri kio ni aparte raportas.

"Esperanto-Muzeo Jokohama" en preparo!

Kiel iris la afero?

Jam de la lasta duono de 2019, ni NPO Esperanto Jokohama, kun la oferita mono de anonimulo je 30 milionoj da enoj, decidis fondi "muzeon", en kiu ni ekspozicios materialojn pri Esperanto al la vasta publiko. En 2020, serĉado de taŭga domo komenciĝis. Komence ni celis "oficejan konstruaĵon", kaj fakte trovis taŭgan domon, sed tio kostas pli ol ni havas.

En septembro 2020, ni komencis denove serĉi, inkluzive de la reuzo de domo loĝita de familio. En la komenco de novembro, ni trovis japaneskan domon du-etaĝan, kaj trovis ĝin taŭga. Poste inspektis ĝin estraranoj kaj aliaj de nia rondo, kaj findecidis aĉeton. La kontrakto okazis en la 10-a de novembro, kaj per la finpago en la 4-a de decembro, ni akiris la domon.

Kia domo ĝi estas?

Do kia estas la domo? Estas stacio "Idogaya" de la fervojlinio *Keikyu*. Ĝi estas atingebla je 7 minutoj per ekspreso de la centra Yokohama. Ĉirkaŭ la stacio estas komerce prospera distrikto, sed ĉirkaŭe estas tute trankvila hejmdoma distrikto. Kaj de tie paŝe kelkajn minutojn. Ĝi situas apud tiu *Keikyu*-linio, kaj la bruo de multaj trajnoj estas ja ĝena, precipe por loĝantoj, sed ni ne sentis tion tro ĝena. La vojo tuj antaŭ la pordo estas tro malvasta por aŭtoj, kaj ne estas spaco por garaĝo. Tia brua kaj aŭta problemo igis la prezon de la domo kaj la tero favora. La tero okupas



103 kvadratajn metrojn, kaj tie domo 2-etaĝa, nome 106 kvadratajn metrojn vasta.

Ĝi havas tataman ĉambron, sed ni intencas ŝanĝi ĝin al eŭropstila domo je nia propra mono, por fari ĝin ĉambro por ekspozicio, kunsido kaj lernado.

Kiam oficiale uzeblas?

Post la aĉeto, la Prepar-Grupo de la Muzeo energie laboris; instalis meblojn, movis jam ofertitajn librojn de la provizora tenejo ĉe ges-roj Doi, kaj aranĝis la librojn, ktp. Ni ja ricevis oferon de la membroj. En la 19a de decembro estis provizora Malfermo al la membroj, en kiu aliĝis 20 homoj.

Ni planas oficialan Malfermon en la ĉi-jara aprilo. (Sibayama Zyun'iti)

La provizora malfermo 2020-12-19



La Jar-kajero 2020a de Nefitocela Organizo Esperanto Jokohama

Sibayama Zyun'iti, la Redaktoro

Jen estas la skizo de la ĉefaj eventoj en 2020. Multo planita nuligis pro la kvarantena konsidero kontraŭ KOVIM-19.

noto: [KK] estas por la Gubernia Kunven-Centro (Kanagawa Kenmin Sentaa)

*jan. 26 [KK]: La jarkunveno de nia rondo

*feb. 15 [KK]: Hama-Ronda Vespero pri la UK-lando Kanado. Ve, poste la UK estis nuligita.

*feb. 16 [ĉambro en la domo de JICA]: Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havis prelegon. S-ino Doi Ĉieko prelegis pri Hasegawa



Teru, esperantista pac-batalanto. Poste Namba Fumiharu prezentis pri Esperanto. En ties komenco, li montris esperantistan solidaran mesaĝon el Vuhan, Ĉinio, pri la kronvirusa epidemio.

*jun. 5 [per Zoom]: la 118a Legokunsido, en kiu 6 rondanoj preparolis pri sia favorata libro.

*sep. 11 [per Zoom]: la 119a Legokunsido, en kiu 5 preparolis pri "Amo kaj malamo" de Julian Modest.

*okt. 17 [KK]: Anstataŭ la kutima Hama-Ronda Vespero, 14 kunsidis pri la denova serĉo de taŭga konstruaĵo por nia muzeo.

*nov. 21 [muzeo ->KK]: Post vizito de la aĉetota domo por nia muzeo, anstataŭ la kutima Hama-Ronda Vespero, 16 kunsidis pri la administrado de la muzeo.

*dec. 4 [per Zoom]: la 120a Legokunsido, en kiu 7 preparolis pri "Tradukaĵoj de japanaj beletraĵoj" de Aida Kiyoshi.

*dec. 19 [muzeo]: Estis la provizora malfermo de la muzeo al la rondanoj. Sekvis salutoj kaj gratuloj.

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj

[muzeo]: membroj el la klasoj kunsidas de decembro en la nova "muzeo".

(1) Klaso "Eseoj", gvidata de Doi Hirokaz. [muzeo]: Oni kaj legas "Tamen ĝi moviĝas", kaj japanigas infanlibrojn esperantigitajn de la baska lingvo, nome "Ĉapulo la fantomo".

(2) Klaso "Teksantoj", gvidata de Doi Ĉieko. [per Zoom]: Oni finlegis "Kie boacoj vagadas" en novembro, kaj nove legas "Joĉjo".

(3) Klaso "Belĉielo", gvidata de Doi Ĉieko. [KK]: Oni legis romanon "Silento".

(Pro neĉeesto de unu membro, la alia aliĝis al la grupo "eriko".)

(4) Klaso "eriko", gvidata de Doi Ĉieko. [muzeo]: Oni legas "Rakontoj de poŝtista sako".

(5) Daŭriga kurso, gvidata de Doi Ĉieko. [muzeo]: Post "Hanako lernas Esperanton", oni finlegis "Karlo" kaj komencis legi "Barbro kaj Eriko".

(6) Jokohama Salono, sen gvidanto. De majo oni lernas per [zoom]. Principe, en la 1a kaj la 3a sabato de monato, oni legas "La Ŝtona Urbo", en la 2a sabato, oni interkritikas liberan frazfaradon esperantlingvan, kaj en la 4a sabato, oni interkritikas esperantigon el la japana lingvo.

Amabie, japana folkloro sireno kiu forigos epidemion

NAMBA Fumiharu

En la situacio de mondskala epidemio per KOVIM-19, multaj uzantoj de Twitter en Japanio ekhavis intereson al japana folkloro monstro *Amabie*, kiu ŝajnas esti la sireno kun tri piedoj kaj longaj haroj. Pro la legendo ke desegni kaj montri la formon forigos epidemion, diversaj kaj buntaj desegnaĵoj de *Amabie* aperis surrete kun preĝo por regajni pacan kaj sanan tempon.

Plue, la konateco kaj desegnaĵoj de *Amabie* nun disvastiĝas ne nur surrete sed ankaŭ al diversaj lokoj en urboj. Ekzemple, en la stacidomo Yokohama multaj fervojistoj faris proprajn desegnaĵojn de *Amabie* laŭ la temo “Mi volas fari tion post la fino de epidemio!”. Kaj oni afiŝis la kreaĵojn sur reklamejoj en la stacio, anstataŭ reklamoj kiuj tute malmultiĝis pro la epidemio.

La origina dokumento pri *Amabie* estas Edo-epoka ĵurnala ligno-gravuraĵo (*Kawaraban*), kiun oni eldonis en 1846. Nun tiun kopion la ĉefa biblioteko de universitato Kioto publikigas sur sia cifera arkivo.

Kun espero kontraŭ la epidemio, mi prezentu la dokumenton kun traduko al Esperanto.



(Libera Licenco kun Atributo: La ĉefa biblioteko de Universitato Kioto posedas)

[Traduko de la *Kawaraban*]

Iu brilanta objekto aperis ĉiunokte el maro de la regiono Higo^(*). Loka burokrato iris kaj observis. Kaj aperis ulo kiel jena bildo. Mi loĝas en la maro kaj nomiĝas *Amabie*. Ekde ĉi-jaro dum ses jaroj rikolto riĉiĝos tra ĉiuj landoj. Dume epidemio disvastiĝos. Rapide desegnu min kaj montru al popolanoj. Dirinte la ulo malaperis sub la maron. Jena kopio estas tiu desegnaĵo de la burokrato raportanta al Edo^(**).

Mezo de Aprilo, Kōka-3^(***)

(*1) Nuntempa japana gubernio Kumamoto.

(*2) Tiuepoka nomo de Tokio.

(*3) Komenco de majo 1846, en nuna Gregoria kalendaro.

La 50a Zamenhof-Festo de Kanagavo

La festo estas por la 4 Esperantaj grupoj en Gubernio Kanagavo (Kanagawa), nome Jokohamo, Kawasaki, Odawara kaj Huzisawa. En la 26a de decembro 2020, de 13:30 ĝis 15:30, ĝi okazis per interreta “Zoom”, kaj partoprenis entute 21 personoj. Oni aŭdis prelegon de s-ro Sato Ryusuke. De Jokohamo, la muzeo estis prezentita. (Sibayama Zyun’iti)

